# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

N° 204 MARTO 2000

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E. = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPERANTO

*** *Sankta* PIO X-a, *preĝu por ni* ***

Imp. MOSER - 68127 NIEDERHERGHEIM



# Sommaire/*Enhavo*


Pages/*Paĝoj*

| | |
|---|---|
| Le mot du président-*La bileto de la prezidanto* | 3 |
| Prière - *Preĝo* | 5 |
| *Letero de Taizé 2000* | 6 |
| *Protokolo* | 11 |
| *Raporto de la jaro 1999* | 12 |
| *En nia Asocio* | 13 |
| Voĉdonilo | 16 |
| Kalendaro | 17 |
| 53-a IKUE Kongreso Rimini-Romo | 19 |
| Anoncoj | 21 |
| Abonnements - *Kotiztabelo* | 23 |


**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**


Expéditeur/: Ass. Cath. Française pour l'espéranto
*Sendinto* 9, rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR


**Motif de non distribution**

- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres


Périodique Semi-routé

**PORT PAYE**

COLMAR (68)

## Surkovrile

Desegno de P.Lataste pri pilgrimanto . Vidu la eventojn en la rubriko "Kalendaro"

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio <u>nepre antaŭ</u> la 10.a de junio 2000. Venonta bulteno aperos fine de junio.

Finpresado la 24/03/2000


***FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO***

**Nro 204 Marto 2000**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )

CCP : 2 324 93 N Rouen



Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C.St-Saëns
76000 ROUEN

Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS

Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON

Religia Konsilanto :
P-ro L.BOURDON
7,Av. Salomon
59800 LILLE

Peranto IKUE:
S-ro M.COLLEU
95,Rue Victor Hugo
80440 BOVES

<u>Redakcio :</u>
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Rete 100623.3022@Compuserve.com




# Le Mot du Président

Bientôt les cloches sonneront la joie du matin de Pâques; Ce jour est la plus grande fête du monde chrétien, puisqu'il commemore la resurection du Christ, prémisse de la nôtre lorsque les temps seront accomplis.

Mais en cette année 2000 cette fête sera sans aucun doute le point culminant du Jubilée auquel nous sommes tous appelés à prendre part à Rome ou même là où nous sommes.

Depuis l'institution du premier jubilée en 1300 par la Pape Boniface VIII, celui de l'an 2000 est le 28ème et aussi le plus important car il coincide avec la 2000ème année de l'Incarnation.

Le mot Jubilée évoque la joie et nous devons nous réjouir d'avoir le privilège de vivre celui de cette année afin d'y puiser les forces de renouveau qui font si cruelement défaut à notre monde moderne et matérialiste,donc dénué d'amour à l'égard du prochain.

En tant que chrétiens et en tant qu'espérantistes nous aurons, plus que tout autre, le désir et le courage de puiser dans notre Foi la force et la persévérence necessaires pour acomplir la Justice, aimer la bonté afin que le coeur des hommes change vraiment et que, comme le dit le psaume 85, amour et vérité se rencontrent et que Justice et Paix s'embrassent .

Bonnes et saintes Pâques à tous :

# La Bileto de la Prezidanto

Baldaù la sonoriloj sonoros la ĝojon de la Paska mateno. Tiu tago estas la plej grava festotago en la kristana rondo, ĉar ĝi rememorigas la resurekton de Kristo, premiso de la nia, kiam la tempo plenumiĝos.

Sed en tiu jaro 2000, tiu festotago sendube estos la elstara punkto de la Jubileo, al kiu ni ĉiuj estas alvokitaj partopreni en Romo aù eĉ kie ni staras.

Depost la starigo de la unua jubileo en 1300 pere de Papo Bonifaco VIII, la jubileo de la jaro 2000 estas la 28-a, kaj samtempe la plej grava, ĉar ĝi koincidas kun la 2000-a datreveno de la Enkarniĝo.

La vorto Jubileo evokas la ĝojon; ni devas ĝoji pri la privilegio travivi tiun de la nuna jaro, por ke ni ĉerpu el ĝi la renovigan forton, kiu tiel forte mankas al nia materialista moderna mondo, do sen amo rilate la proksimulo.

Kiel kristanoj kaj esperantistoj, pli ol aliaj, ni havos la deziron kaj la kuraĝon por ĉerpi el nia Fido la necesajn forton kaj persistemon por plenumi la Justecon, ami la bonecon, por ke la homaj koroj vere ŝanĝu kaj, kiel diras la psalmo 85, Amo kaj Vero renkontiĝu, Justeco kaj Paco kisu sin reciproke.

Bonan kaj sanktan Paskofeston al ĉiuj.




# PASKO

Al la paska Viktimo levu, kristanoj, laùdoferojn
La Safido elaĉetis sian gregon;
La senkulpa Kristo repacigis nin pekulojn
kun la Patro.

Morto kaj vivo mirinde duelis inter si;
La aùtoro de la vivo mortis;
Sed nun Li denove vivante triumfas.

"Rakontu al ni, Maria :
Kion vi vidis survoje ?"

"Mi vidis la tombon de la vivanta Kristo
Kaj la gloron de la reviviĝo,
La anĝelojn, tion proklamantajn;
Lian morttukon kaj vestojn.




Kristo, nia espero, reviviĝis:
Li iras antaù vi en Galileon. "

Ni firme kredas, ke Kristo reviviĝis.
Nun Vi, Kristo, venkanta Reĝo,
Donu al ni la savon. Haleluja !

(Paska liturgio)

# *Priĝoja miro*

Kie ajn vi estas trakontinente,vi, kiu deziras percepti la misteron,kiu enkoras vian koron, ĉu vi antaùsentas la profundan belecon de la animo homa ?

Kia estas tiu beleco kaŝita ? Ĝi kuŝas en la aùdaco de iu atendo. Eĉ se ni ĝin ne konas, iu el niaj plej intimaj deziroj de nia estaĵo estas ami. Sen amo ĉu nia vivo havu sencon ?

Dio amas min: tio estas realaĵo kelkfoje malmulte atingebla [1]. Sed venu la tago de iu malkovro : se mi permesas al Lia amo min trafi, mia vivo malfermiĝas al la aliaj. [2]

Akceptante tiujn, kiuj alvenas lin, Kristo al ili diras: "Feliĉaj la koroj simplaj "[3].

Simpla koro atentemas por vivi la estanton [4] kaj ekpretas antaùeniri de komenco al komenco.[5]

Kredo kielas fidelelanon tuthumilan, milfoje dumvive rekaptitan. Simpla koro akceptas ne ĉion kompreni en la Evangelio. Ĝi povas al Dio diri: "Mi baziĝas ne nur sur mia kredo. Kion mi ne komprenas aliaj ĝin komprenas kaj ili prilumas mian vojon" .[6]

*1/ Dio diras al ĉiu: "Vi multe karas miaokule, vi havas prezon por mi kaj mi vin amas".*

*2) Pensulo el Rumanio, Dimitru Staniloae, kiu konis la politikan malliberejon skribis: "Mi serĉadis Dion en la homoj de mia vilaĝo, poste en libroj kaj ideoj. Sed tio donis al mi nek pacon nek amon. Iutage mi malkovris, legante la Patrojn de la Eklezio - tekstoj de kristanoj el la unuaj jarcentoj - ke eblis reale renkonti Dion preĝdanke. Iom post iom mi komprenis, ke Dio proksimas, ke li min amas kaj ke, se mi lasas lian amon plenigi min, mia koro malfermiĝas por la aliaj. Mi komprenis, ke amo estas komunio kun Dio kaj la aliaj."*

*3 Mt 5,3*

*4 Maltrankvilo kaptas vivajn fortojn kaj senmovigas ilin. Vidu Mateon 6,25-34*

*5 En la 4a jarcento,Sankta Gregorio el Niso (Nysse) skribas: ni iras el komenco al komenco tra komencoj ĉiam novaj.*

*6 Ni rajtas nin apogi sur la kredo de ĉiuj, kiuj estis antaù ni, ekde la unuaj kristanoj ĝis la hodiaùaj.*



Tia simpleco kompaton vekas,atentigas al tiuj, kiuj tutmonde forlason kaj humiligojn spertas .[7]

Iujn tagojn ni havas la impreson, ke ni preĝas per preskaù nenio. Povas esti ŝajnsenposediĝo, sed Dio helpas pri tio konsenti.

Eĉ kiam ni okaze malproksimiĝas de Dio, ni povas transdoni ĉion al li, en lin demeti ĉion. [8]

Feliĉas tiu, kiu kapablas diri al Kristo :

"Vi, Kristo, vi scias, ke ni malfacile eldiras nian deziron kuniĝi kun vi.[9] Sed via Spirito Sankta revigligas en ni iun aùdacon, kiu konsistas en fordono en vi.

Vi vidas, kiu mi estas. Vi konis la homan kondiĉon [10]. Mi nenion kaŝas el mia koro. Vi ne ignoras, ke mi kelkfoje tiriĝas samtempe plurflanken. Sed kiam mia interna estaĵo konas vakuon,restas en mi soifo pri, presenco via kaj kiam mi ne kapablas preĝi, vi estas mia preĝo.[11]

*7 Ĉu Dio naskus la suferon ? Ne Dio neniam estas la aùtoro de la malbono, li ne volas la homan angoregon kaj ne pli la militojn, la tertremojn, la akcidentperfortojn... Li neniam estigas timon kaj turmentigon sed li partoprenas en la doloro de tiu, kiu trairas suferon. En kelkaj mondregionoj estas ekkonsciiĝo rilate la homajn suferojn. Sanĉelite de la nekompreneblaj doloroj de la senpekuloj multnombraj junuloj sin demandas : kiamaniere esti atestanto de la Evangelio ? Kaj tra sia vivo ili serĉas efektivigi solidargestojn.*

*8 Dio neniam povas naski maltrankvilon, li ne altrudas kredon. Fido je Dio ne komunikiĝas per argumentperforto.*

*9 Iuj infanoj komprenas, pli ol ni imagas, la preĝon . Feliĉas la tre juna, kiu vekiĝis al Diokomunio dank'al siaj proksimuloj !*

*10 Sankta Johano skribas tiujn mirajn vortojn :"Interas nin Iu, kiun vi ne konas" (Jo 1,26). Kiu estas tiu "Iu" meze de ni ? Estas Kristo, la Releviĝinto. Eble ni konas lin nemulte sed li restas tutproksima je ĉiu homo .*

*11 Kiam,solaj, ni ne scias kiel preĝi, kelkfoje niaj lipoj restas fermitaj, sed, en la silento, nia animo estas malfermita antaù Dio, ĝi alvortas lin. Kaj la Spirito Sankta preĝas en ni. Li eĉ povas veki en ni esprimon al kontemplado. Vidu Rm 8,26-27.*

Preĝo estas Evangelia trezoro [12], ĝi malfermas vojon, kiu kondukas al amo kaj pardono.

Pardono povas ŝanĝi kaj mian koron kaj mian vivon :tiam malproksimiĝas severaj kaj malmolecaj juĝoj por fari lokon al boneco kaj bonvolo de l'koro. Kaj ni kapabliĝas komprenserĉi pli ol kompreniĝi.[13]

Tiu , kiu elpardone vivas, sukcesas trairi la malfacilegajn situaciojn, samkiel printempe ke la riverakvo trairas grundon daùre frostitan.

Tiel senprovizaj ni estas, iu el niaj hodiaùaj urĝoj estas meti komprenon tie, kieas oponoj . Certaj memoroj el la pasinteco sufiĉas por ke malproksimo daùru inter personoj kaj ankaù inter nacioj.

Nenio pli tenacas ol la memoro pri vundoj kaj humiligoj [14]. Pardonon kaj rekonciliĝon serĉi, malfermas neatenditan estontecon. [15]

Kaj kio veras por ĉiu persono ankaù veras en tiu komunimistero, kio estas la Korpo de Kristo, Lia Eklezio [16].

*12 Parolante pri kanto dumpreĝa Olivier Clément skribas:" Ekzistas tuta tradicio de l'paciga ripetado, kiu evakuas la agitadon de la intelekto kaj kiu permesas al ĝi preĝdisponebliĝi. Certaj , kiuj scias preskaù nenion pri la mistero, tiam eniras ĝin. Tiu preĝo ne povas esti tro komplika. La esenco de l'Kristanismo povas diriĝi per kelkaj vortoj. Dolĉeco venas tra tiu ripeta kanto, iu interna paco (El la libro "Taizé,iu senco por la vivo" Bayard-Eldonejo 1997).Tial ni rajtas kanti:"Jesuo la Kristo,interna lumo, ne permesu, ke niaj tenebroj parolu al mi" (vortoj el la 4a jarcento); "Dio kapablas doni nur sian amon (el la 7a jarcento); aù plie "Vi, kiu amas nin, via pardono kaj presenco en ni naskas la klarecon de la laùdo; ".*

*13 Kun miaj fratoj, tiuj kiuj estas en Taizé en tiuj kiuj tramonde vivas, ofte la plej malriĉaj, ni konscias, ke la vokiĝo de nia komunumo alvokas nin al pli da simpleco. Tio signifas: nealtrudu nin, ne esti spiritaj majstroj, sed homoj aùskultantaj kaj strebantaj kompreni. Ni malvovris, ke dank'al korsimpleco, dank'al rimedoj kelkfoje tre malgrandaj, ni povas vivi gastigon,kiun oni opinias neebla. La gejunuloj, kiujn ekde tiom longatempe ni akceptas, pasigas unu semajnon en Taizé, sed ni ne organizas movadon ĉirkaù nia komunumo.*



Ĉu ne ĉie estas humiluloj, kiuj preparas la estontvojojn? Absorbas ilin iu espero radia. Ne ĉiam la prestiĝaj talentoj aù la grandaj facilecoj okazigas la plej profundajn ŝanĝiĝojn, sed, pli ol supoze, la amo ardega.

La Spirito Sankta, en ĉiu elverŝita [17], donas liberon kaj spontanon. Li redonas vivguston al tiuj, kiuj perdas ĝin; Li liberigas de l'malkuraĝiĝo . Nek duboj nek impreso de silento de Dio elirigas ties Spiriton Sanktan el ni.

Kiu sin malfermas al lia inspiro kaj humilaùskulte akceptas lin eniras aventuron internan.

En la grandaj vivdoloroj la Spirito Sankta subtenas kaj konsolas [18]. En li jubilfonto,[19] leĝerĝoje , daùrade ofertiĝas. Kaj tiu ĝojo pli proksimigas nin al tiuj, kiuj suferon trairas.[20]

Ses jarcentojn antaù Kristo, Dio alparolis tiavorte: "Ne memoru la antikvajn eventojn, forgesu la pasintaĵojn, jen mi tuj faros novaĵon, jam ĝi ekiĝas, ĉu vi ne vidas ĝin ?" [21].

*14/ La malbona pasinteco, plena je disiĝoj kaj perfortoj, persistas en ni. Tial ni devas lasi Dion forigi la malbonan pasintecon (Athenagoras,patriarko el Konstantinopolo).*

*15/ La dumila jaro estas periodo markita por konkrete realigi kaj pardonon kaj repaciĝon ne nur inter ni, kristanoj, sed en la diversaj situacioj, kiuj ĉirkaùas nin kaj ankaù kun nekredantoj.En Taizé, daùrigante la "konfidpilgrimon surteran", la vendredo de ĉiu semajno en la jaro dumila estas dediĉita al pripenso kaj preĝo por vivi l'pardonon kun la ĝojo ĝin subtenanta.*

*16/ Okaze de sia vizito al Taizé,la 5an de oktobro 1986, la Papo Johano-Paùlo la dua diris tion : "...vi kontribuos al tio,ke ne malfervoriĝu la strebado de l'Kristo dezirita por sukcesi retrovi la videblan union de ties korpo, en la plena komunio de l'sama kredo. Vi ja scias ĝis kiagrado miaparte mi konsideras la ekumenon kiel neceson,kiu koncernas min, pastoralan prioritaton en nia ofico ; pro tio mi kalkulas kun via preĝo. Dezirante esti vi mem iu "parabolo de komuneco" vi helpos ĉiujn, kiujn vi renkontos, por ke ili restu fidelaj je sia eklezia aparteno, frukto de siaj edukado kaj konscienelekto, sed ankaù por ĉiam pliprofunde eniri la komunimisteron, kio estas Eklezio en la Dia volo".*

*17/ Ag 2,17*

*18/ Jo 14,16*

*19/ Dum tiu dumila jaro la "Jubileo" invitas al ricevado de la spiriton de la "jubilo" ne nur portempe sed tutvive. La jubilo en la Spirito Sankta estas ĝojtravivaĵo spertita de Jesuo . (Luko 10,21) kaj ni mem povas ankaŭ ĝin travivi. Ĝi estas intime ligita je la estanteco de l'Spirito Sankta en ni.*

*20/ Olivier Clément skribas tiun meditadon: " Kelkaj demandas sin kiel eblas ĝoji, kiam estiĝas tiaj malfeliĉojn en homa vivo. Granda ĝojo enas nin, sed ĝi ne senkompatigos nin rilate la suferojn de la aliuloj. Kontraŭe ĝi igos nin ankoraŭ pli kompatemaj kaj ni kapablos samtempe konservi funde de ni tiun grandan ĝojon de la Releviĝinta Kristo kaj profunde eniri la angoregon de l'proksimulo. Necesas vivi la triston kaj samtempe konservi en si la ĝojon, ĉar ni scias, ke finfine la releviĝo havos la vorton finan ". (El la libro "Taizé, iu senco por la vivo"*

*21/ Is 43,18-19.*




Jes, ĝojmiro: la Spirito Sankta volas travidebligi nin por ke ni similu printempĉielon.

La Evangelio entenas tiel helan esperon kaj tiel ĝojalvokon ke ni ŝatis ĝisiri la domon de ni mem por transdoni ilin proksimen kaj malproksimen.

Kie estas la fondo de l'espero kaj de l'ĝojo ? Ĝi estas en Dio, kiu senlace serĉas nin kaj malkovras en ni la belecon de la animo homa.

<u>Preĝoj:</u>

*Spirito Sankta, ne permesu, ke niaj koroj malsereniĝu, trankviligu nin en niaj obskuroj, donu al ni ĝojon, kaj ni silente kaj pace atendos, ke leviĝu por ni iu lumo evangelia.*

*Jesuo la Kristo, en niaj profundoj vi ekkonas tiun kontemplan atendon: nian animon plenigas iu soifo, kiu kondukas nin al vi.*

*Jesuo, nia espero, dank'al la malmulto, kiun ni komprenas en la Evangelio, vi permesas al ni malkovri tion, kion vi atendas de ni.*

*Jesuo la Kristo, dumpreĝe niaj povraj vortoj penas por eldiri nian deziron pri komuniiĝo kun vi, sed jam vi akceptas nin.*

Tradukis Pastro Roger Degrelle.



# <u>Protokolo de la Komitatkunveno de la 19-a de Januaro 2000 en Parizo</u>

Ĉeestis :S-ro Bessière,S-ino Lafargue,F-ino Chaney,S-roj Lafargue kaj Villeneuve.

Petis senkulpigon: Pastro Bourdon,F-to Marmou,F-ino Michel,s-roj Basso Colleu, Despiney kaj Pons.

Observis: Pastro Héroux..

S-ro Villeneuve raportis pri la financoj de la asocio kaj komunikis la financan raporton, kiun vi legos sur alia paĝo de tiu-ĉi bulteno.

S-ino Chaney klarigis , ke dank'al nia reklamo sur Franca Esperantisto 5 novaj membroj aliĝis la asocion.

La venonta ĝenerala kunveno okazos la sabaton la 6-an de majo 2000 en Parizo. Vi legos sube la necesajn informojn por ĉeesti ĝin kaj trovos la nomojn de la kandidatoj por la elekto de 4 komitatanoj.

Nia venonta kongreso estos samtempe pilgrimo al Lisieux en majo 2001. La precizan daton oni fiksos okaze de la ĝenerala kunveno. La decembra bulteno publikigos la detalajn indikojn por aliĝi.

La venonta komitatkunveno okazos en Parizo la 6-an de majo 2000,tuj post la ĝenerala kunveno.

# Agadraporto pri la Jaro 1999

La plej grava evento de la jaro 1999 estis nia pilgrimo al Lourdes de la 30-a de aprilo ĝis la 4-a de majo . Dudek esperantistoj partoprenis ĝin. Ili ĉiutage havis diservon en la baziliko kaj uzis la novan meslibreton kun kantoj, kiun eldonis nia asocio dank'al la kompetenteco de S-ro Colleu.

Pastro Girault prelegis pri la temo de la Unuiĝo de la Eklezioj kaj forte interesis la ĉeestantaron. Lia verko tre interesa estis publikigita sur nia bulteno.

La pilgrimo estis internacia, ĉar nederlandano, italo kaj brazilanino partoprenis ĝin, por ĉies plezuro.

Kompreneble la pilgrimantoj vizitis la tombon de Pastro Peltier, nian fondinton, kaj preĝis apud ĝi.

Dum la tuta jaro S-ro Pons vigle zorgis pri la disvastigo de la eta Biblio "Dio parolas al siaj infanoj". La libreton jam senpage ricevis esperantistoj en multaj landoj ekster Eùropo.

Nia marta bulteno estis la 200-a eldonita de nia asocio, kiu rajtas fieri pro sia longdaùra ekzisto.

Nia asocio zorgis, ke nia bulteno estas enlistigita , kiel abonebla , en Franca Esperantisto. Krome ni reklamis en tiu revuo por



konatigi nian agadon kaj instigi la katolikojn aliĝi nian asocion.

En 1999 ni memorigis la 140-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof per speciala artikolo en la artikolo en la oktobra numero.

Je la jarfino nia asocio nombris 125 membrojn, do unu pli ol en la jaro 1998.

## EN NIA ASOCIO

Novaj membroj :

S-ino ARGNEY Anne-Marie (Ille et Vilaine)
S-ro FAIRBANK James (Paris)
S-ro FONTAINE pascal (Hauts de Seine)
S-ro VEDRINE André (Rhône)
S-ro LUEZ Daniel (Aisne)
S-ro PINGICZER L (Loire-Atlantique)
S-ro GOETSCH Eric (Bas-Rhin)
S-ro GOURICHON Maurice ( Maine et Loire)
S-ro JACOB Emile (Cher)

Bonvenon al la genovuloj.

Donacis monon:
S-inoj LAFARGUE, Kaj CHIALVO, S-roj MORIN,MAJOREL,BAUD, VANSPRANGHE, MARTIAL kaj anonimulo

Bonfarantino 1999 : S-ino Lafargue
Bonfarantoj 2000
S-inoj LAFARGUE kaj GILLES, S-ro LECOCQ
Dankegon al ili pro ilia grava helpo al nia asocio.

## *LA KASISTO ALVOKAS !*

### ANTAU FORGESI PAGU TUJ VIAN KOTIZON 2000

Helpu nin . Dankon !
Sendu rekte al la kasisto . Vidu la adreson pago 2.

# FINANCA RAPORTO 1999

| ENSPEZOJ | FF | ELSPEZOJ | FF |
|---|---|---|---|
| | | | |
| Kotizoj | 5440,00 | Bulteno | 2109,85 |
| Donacoj | 687,00 | Donacoj | 0,00 |
| Rentumo sparkaso | 1548,45 | Korespondado | 2537,32 |
| Kongresaj aligiloj | 550,00 | Komitatkunvenoj | 1298,00 |
| Kongreso | 14207,00 | Kongreso | 14473,10 |
| Libro eldonado | 0,00 | Libro eldonado | 400,00 |
| | | Posta takso | 8,00 |
| | | | |
| SUMO | 22432,45 | SUMO | 20826,27 |
| | | | |
| En la kaso 01/01/99 | 22864,52 | En sparkaso | 12877,92 |
| Positiva saldo | 1606,18 | En P.C.K | 11592,78 |
| En la kaso 31/12/99 | 24470,70 | Sumo | 24470,70 |
| | | | |
| | | | |

La kasisto: G. Villeneuve



## ĜENERALA KUNVENO 2000
## RENOVIGO de 1/3 de la KOMITATO

La ĝenerala kunveno de nia asocio okazos en la konvento S-ta Jakobo, 20 Rue des Tanneries , 75013 PARIZO la 6-an de majo 2000 je la 14h.

En tiu ĝenerala kunveno ni devos renovigi unu trionon de la komitato.

Jen la instrukcioj por la voĉdonado:

1) Respondu al la demandoj 1 kaj 2 sur la voĉdonilo, kiu staras sur la sekvonta paĝo .
2) Enmetu la voĉdonilon en koverto sen indiko.
3) Enŝovu ĉi tiun en alian, kiun vi sendu al la sekretariino,
   F-ino Chaney
   56,Rue de Corvisart
   75013 PARIS

**antaŭ la 25-a de aprilo 2000**

4) Dorse de tiu koverto; skribu la vorton "VOĈDONO" kaj vian nomon.

**Atentu !** Ne sendu ion alian en ĉi tiu koverto, kiun oni malfermos nur okaze de la ĝenerala kunveno, la 6-an de majo 2000.

# VOĈDONILO

1) Ĉu vi aprobas la agadraporton ?

JES NE SINDETENO (1)

2) Ĉu vi aprobas la financan raporton?

JES NE SINDETENO (1)

3)Renovigo de 1/3 de la komitato.

Estas 4 kandidatoj por 4 postenoj.Vi rajtas forstreki nomojn,sed devas esti 4 nomojn entute.

S-ro BESSIERE S-ro BASSO

S-ro CHEVALIER Pastro HEROUX

(1)Forstreku la senutilaĵojn.

Sendu ĝin al:
F-ino CHANEY
56,Rue de Corvisart
75013 PARIS
nepre antaù la 25-a de aprilo 2000.



# KALENDARO

## 2000

31/05 ĝis 04/06 HAMBURGO (Germanio)
94-a Germana Katolika Foiro kun Esperanto-Stando kaj prelego

15/07 SAINT-JEAN PIED-DE-PORT (Francio)
PILGRIMO al SANTIAGO de COMPOSTELLE Piede .
Informoj ĉe S-ano Rudolf-Josef FISCHER
Gustav-Adolf Stasse 2a
D-48356 NORDWALDE . Germanio

15/07 ĝis 22/07 SEBRANICE (Ĉehio) apud Litomysl
19-a IKUE E-Tendaro.
Ĉiu tendara tago komenciĝos per esperantlingva Sankta Meso en tendara frateca kaj amikeca etoso. Venu travivi en ĉarma naturo belan semajnon en la Jaro de la Granda Jubileo .
Detalaj informoj kaj aliĝiloj estas haveblaj ĉe : IKUE-Katolika Sekcio
Trsicka ul.6 CZ-751 27 PENCICE .

25/07 ĝis 01/08 TEL-AVIVO (Israelo)
85-a Universala Kongreso de Esperanto
http://ourworld.compuserve.com/homepages/profcon/m_uk85.html

05/08 gîs 12/08 — HONGKONGO (Ĉinio)
56-a Internacia Junulara Kongreso

10/08 gîs 14/08 kaj de 15/08 gîs 20/08

VENECIO (Italio)
JUNULARA MONDA TAGO 2000
Grupo Esperanto: respondeculo
Paola Ambrosetto
retadreso: esperantovenezia@libero.it

ROMO (Italio)
JUNULARA MONDA TAGO 2000
(adreso: same kiel Venecio)
(Francaj gejunuloj povas peti
subvencioj ĉe la redaktoro)

13/08 gîs 20/08 — TAIZE (Francio)
4-a Junulara Ekumena Esperanto
Tendaro (JET)
rete: http://www.taize.fr
aliĝu ĉe:
Bernard Eichkorn, Romaùsring 20
D-78050 VILLINGEN Germanio
rete: Bernhard.Eichkorn@esperanto.de

02/09 gîs 07/09 — RIMINI-ROMO ( Italio)
53-a Kongreso de IKUE
Jubilea Pilgrimo



## 53-a KONGRESO DE IKUE - Jubilea pilgrimo
## RIMINI, Italio, 2.-7.09.2000. La sep sakramentoj

**Programo:**

Sabaton la 2-an de septembro:

- posttagmeze: alveno kaj enloĝigo en la hoteloj.

19.30 Vespermanĝo
20.45 Rozario fronte al la paroĥa preĝejo, antaŭ la monumento de Beata Patro Pio kun diversnaciaj kantoj al Maria.

Dimanĉon la 3-an de septembro - La bapto:

08.30 Oficiala komenco de la IKUE-jubilea pilgrimo.
Matenaj preĝoj - ĉantado de laŭdoj.
09.00 Prelego pri "La konvertiĝo".
11.00 Sankta Meso.
12.30 Tagmanĝo kaj libera tempo. Ebleco viziti la ekspozicion pri la Mortotuko.
15.00 Movadaj kunsidoj.
19.30 Vespermanĝo.
21.00 Prelego pri la Mortotuko (parolos Prof-ino Emmanuela Marinella, fakulino pri la Mortotuko kaj universitata docento).

Lundon la 4-an de septembro - La konfirmacio:

Pilgrimo al Asizo - Gubbio - La Verna (reveno al Rimini antaŭ la noktomezo).

Mardon la 5-an de septembro - Konfeso kaj geedziĝo:

Libera tempo ĝis tagmanĝo.
13.00 Pilgrimo al Loreto - kuncelebro de la Sankta Meso.
Vespermanĝo pere de ricevitaj manĝsaketoj.

Merkredon la 6-an de septembro - Episkopa kaj pastra ordinoj:

04.00 Forveturo al Romo, partopreno en la papa ĝenerala aŭdienco, vizito de Jubileaj Bazilikoj.

Ĵaŭdon la 7-an de septembro - La Eŭkaristio:

07.30 Matenmanĝo.
08.30 Matenaj Preĝoj - Laŭdoj. Prelego pri la Eŭkaristio.
11.00 Sankta Meso laŭ grek-katolika rito.
12.30 Tagmanĝo. Libera tempo.
19.30 Vespermanĝo.
20.45 Rozario fronte al la paroĥa preĝejo.

Vendredon la 8-an de septembro - La sanktoleado:

07.30 Matenmanĝo.
08.30 Vizito de la centro de Rimini: Katedralo, Sankta Meso, aŭ post vizito al la katedralo pilgrimo al Covignano, monteto apud la urbo, Krucvojo, Meso en la Pilgrimloko de la Virgulino de la Gracoj.
Fermo de la kongreso.
12.30 Tagmanĝo. Forveturoj.

# I.K.U.E.
# (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista)

## Al la Tutmonda Samideanaro por Tutmonda Enketo

Karaj Gesamideanoj,

ni elkore dankas ĉiujn, kiuj afable respondis al nia unua alvoko. Dank'al ili ni ricevis 164 respondojn. Sed pro peto de diverslandaj geamikoj ni decidis prokrasti la fermon de la enketo kun pli grandskala informo ĝis la 31-a de majo 2000-a.

Sekve ni invitas asociojn, grupojn, anojn kaj gazetaron de la Esperanto-movado disvastigi la enketon ĉien ajn.

Ni invitas KUNTRENI ANKAŬ NEESPERANTISTOJN, SIMPLAJN HOMOJN KAJ KULTURAJN, POLITIKAJN KAJ EKONOMIAJN GRAVULOJN DE VIA URBO EN VIA NACIA LINGVO (ĉiokaze kunsendu la tradukon en E-on: tio pruvos ke la Internacia Lingvo funkcias kaj utilas por monda dialogo).

Ĉiu homo rajtas respondi al kiu ajn religio li apartenas, eĉ nekredanto.

La rezulton ni prezentos dum la 21-a Mitingo por la Amikeco inter la Popoloj en Rimini (Italio) fine de aŭgusto 2000-a.

Bonvolu uzi oficialan enketilon, aŭ fotokopion, aŭ duonon de blanka folio A4 kun jenaj linioj:

Alte: Monda Enketo pri Jesu-Kristo/KIU ESTAS JESUO KRISTO POR MI (sekvu libera loko por mallonga respondo: ne pli ol deko da linioj kun skribaĵo sufiĉe klare legebla) ........................

Malalte: Mia religio....../Lando......Aĝo....../Profesio...................

Nomo kaj Adreso (tre klaraj!) ............................................

Oni sendu la respondojn (kun eventuala E-a traduko) antaŭ la 31-a de majo 2000-a al:

I.K.U.E. ĉe Antonio Gambuti
Via Bellini, 24
I-47039 Savignano sul Rubicone (Italio)

Al la unuaj 10 respondontoj (per poŝto) de ĉiu lando ni sendos filatelan bildkarton de Vatikano.

Ni ege dankas vin pro via afabla kunlaboro.

*I.K.U.E.*



# ANONCOJ

## O1/ El Germanio

Unue mi volas komuniki al vi la datojn de niaj esperantaj mesoj en la katedralo de Speyer (Germanio) por la jaro 2000.
Dimanĉe je la 15a horo.
- la 28an de majo, 27an de aùgusto kaj la 29an de oktobro.

Ekumena diservo estos dimanĉon, la 30an de aprilo,je la 10a, en Kapucijnnenkerk en Oostende (Belgio), kadre de la eùropa kongreso.

Albrecht Kronenberger

## 02/ El Mozambiko :

Post la ciklono "Eline" kaj la inundoj en Mozambiko, la Esperanto Grupo de Torino (Italio) kolektas monon por helpi tiun regionon pere de surloka esperantistino , Silvia Collazuol

retadreso: fceucm@teledata.mz


Por informoj:

Centro Esperanto di Torino
Via Saluzzo 21
10100 TORINO
Konto: CCP 13691100 Por Mozambiko

(el Nova Sento Nro 129)

## Fabelo: La pentristo de vizaĝoj

Iam estis maljuna pentristo,kiu nomiĝis Tuo Lan.
Li loĝis en bambua kabano .Foje li iris al bazaro kaj rigardis la homojn dum horoj.
Kiam li hejmeniris, li tuj pentris vizaĝojn.
Li tiel ŝatis sian laboron, ke li aùdis nek la venton, nek la pluvon , nek la birdojn.
Iam, nokte,li havis viziton .
Tuo Lan demandis : << Kiu estas ĉi-tie ?>>
Voĉo respondis:
<< Mi estas la reĝo de la ĉieloj, mi venas viziti vin.>>
La maljuna pentristo grumbletis, sed malfermis kaj diris: << Eniru kaj eksidu . Mi devas finpentri la vizaĝon de knabineto. >>
Li sin turnis dorse al la reĝo de la ĉieloj kaj relaboris.
Kiam la ĉiela reĝo ekvidis la finitan pentraĵon, li emociiĝis.
Neniam li vidis tiel belan rideton.
Nu, li demandis:
<< Kial vi pentras nur vizaĝojn ? >>
Tuo Lan respondis :<< Ĉar vizaĝoj estas la plej belaj pejzaĝoj de l'mondo.>>
Depost tiu tago, ĉiufoje kiam infano naskiĝas, la reĝo de la ĉieloj elektas vizaĝon en la kolekto de la bildoj de Tuo Lan por doni ĝin al infano.
De tiam ĉiu naskita infano havas vizaĝon kiu reprezentas, por siaj gepatroj, la plej belan pejzaĝon. (el ĉina fabelo)



*Per tiu-ĉi fabelo Lino, Luca anoncas al Vi la naskiĝon de ilia fratino SERENA BASSO la 11-an de februaro 2000.*
*(La Redaktoro havos pluan helpon en la estonteco !!!)*



FELIĈAN PASKON

## Kotiztabelo 2000

| | | Frankoj | Euroj |
|---|---|---|---|
| I.K.U.E kun "Espero Katolika" | | 164 | 25,00 |
| Peranto : S-ro M. COLLEU 95,Rue Victor Hugo 80440 BOVES P.ĉ.k 10 621 81 P LILLE . | | | |
| A.C.F.E kun "Franca Katolika E-isto | unuopulo : | 60 | 9,15 |
| | geedza paro : | 80 | 12,20 |
| | gejunuloj ĝis 25jara, pastro,religiu(in)o : | 30 | 4,57 |
| | bonfaranto : | 200 | 30,50 |

Pagu al: Ass.Cathol.Franc.Esperanto CCP ROUEN 2.324.93.N

Dépot légal : 1er trimestre 2000 C.P.P.A.P : N° 62532
Imprimé par : A.C.F.E à 9,Rue Paul Doumer 68920 WINTZENHEIM
Enregistrée le : 14 Juin 1996 à la Préfecture de Police de Paris sous le n° 026831 ; Journal Officiel du 03/07/1996
Directeur : Albert BESSIERE Directeur délégué: Michel BASSO